

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 4, n-ro 6 (24): marto-aprilo 2012

Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde la 13-a.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,

B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## Redaktore...

*Karaj Legantoj,*

*Post tiu longa vintroperiodo en Eŭropo kaj alie kun neĝo kaj vere malaltaj temperaturoj ĉiuj homoj kaj bestoj estas feliĉaj revidi la sunon kun ĝia varmo.*

*Dume la olekomercistoj kaj la ŝtatoj gajnas multan monon sekve de la altaj prezoj de la brulaĵo. Jam nun multaj homoj ne plu povas pagi hejt-oleon, kies prezo daŭre plialtiĝas kaj kiu daŭre plialtiĝas la teran temperaturon. Tamen malmultekosta brulaĵo vere ekzistas! Legu pri tio nian artikolon « Malmultekosta brulaĵo ». Kiel en multaj aferoj oni trompas nin kaj tiel riskas detrui la teron pro nura profitemo! Tiuj senkonsciaj riĉeguloj devas esti haltigitaj. Jam tiom da fojoj ili sukcesis malhelpi la enkondukon de pli bonaj solvoj. Tial ni alvokas ĉiujn legantojn disvastigi tiun ĉi artikolon. Eble tio helpos iomete.*

*Agrablan kaj interesan legadon deziras al vi,  
Pieter Jan Doumen*

## Dua libro de l' Lingvo Internacia (5)

*(Tweede Boek van de Internationale Taal) (5)*

La kvar ŝanĝoj, kiujn proponis s-ro H. Ph., estis teorie tre bonaj, sed mi jam mem antaŭ kelkaj jaroj pensis pri ili kaj mi trovis, ke praktike ili estus tre maloportunaj. Pli vastan mian juĝon pri ili kaj pri ĉiuj proponitaj ŝanĝoj mi prezentos al la kongreso, se tiu ĉi efektiviĝos. Al ĉiuj ŝanĝoj kiujn, la internacia kongreso de instruituloj post fonda provado trovos necesaj, mi jam antaŭe donas mian plenan konsenton.

Sciigante la amikojn de l' lingvo internacia pri la intencita internacia kongreso, mi devas sciigi ilin, ke la tuta sorto de l' lingvo internacia de nun transiras en la manojn de l' kongreso, kaj la fina formo, kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti leĝdonanta por ĉiuj amikoj de l' lingvo internacia, se la kongreso eĉ trovas necesa ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonlebleco. Mia

rolo nun estas finita, kaj mia persono tute foriras de l' scen[ej]o.

Sed kunligi jam antaŭe la sorton de l' lingvo internacia kun la estonta kongreso estus tre malprudente, kaj tiuj amikoj de l' lingvo, kiuj malfortigus aŭ tute ĉesigus ilian laboradon, 'atendante la kongreson', povus meti nian sanktan aferon en la danĝeron esti perdita je eterne; ĉar la kongreso povas ankoraŭ ne efektiviĝi, kaj se ĝi efektiviĝos, povas ankoraŭ okazi, ke ĝi donos nenian praktikajn rezultojn. Tial ni devas labori diligente laŭ la vojo, kiun ni jam unu fojon elektis, tute egale ĉu la kongreso efektiviĝos aŭ ne, ĉar tiu vojo estas certa kaj kondukos nin al la celo en ĉiu okazo.




Naskiĝdomo de L.L. Zamenhof en Bjalistoko

Esperante<sup>1</sup> la kongreson, mi nun faras persone nenian ŝanĝon en la lingvo. Ĉiujn ŝanĝojn, kiujn oni proponis al mi, kaj mian personan juĝon pri ili, mi prezentos nun jam ne al la publiko, sed al la estonta kongreso. La eldono de la ceteraj kajeroj de la 'Dua Libro' nun jam tial ne estas bezona, la nuna kajero estas la lasta, kaj la aŭtoro nun ĉesigas je eterne sian laboradon. Ĉion kion mi de nun faros aŭ skribos, mi ĝin ĉion faros jam kiel simpla privata amiko de l' lingvo internacia, havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj aŭ materialaj privilegioj, ol ĉiu alia.

Sed por ke la lingvo internacia povu fariĝi de nun tute sendependa de mia persono, kaj ke ĝi povu tute bone kaj regule riĉiĝi, vastiĝi kaj iri

<sup>1</sup> = Atendante.



antaŭen, ĉu mi povos ankoraŭ labori por ĝi aŭ ne, mi donos tie unu fojon por ĉiam respondojn je kelkaj demandoj tuŝantaj la lingvon kaj ĝian estontecon.

La lingvo internacia restas senŝanĝa en tiu formo, en kiu ĝi estas proponita de mi; fari en ĝi iajn laŭvolajn ŝanĝojn mi de nun jam ne havas la privilegion; tiu ĉi privilegio apartenas al la internacia kongreso de instruituloj, kiu estas esperata<sup>1</sup> pro la iniciativo de la Amerika Filozofia Societo; se la intencita kongreso ne efektiviĝos, tiam poste (sed ne antaŭ kvin jaroj de nun) la amikoj de l' lingvo internacia faros mem internacian kongreson, kiu havos la privilegion fari en la lingvo ŝanĝojn kaj bonigojn. La sola ŝanĝo, kiun mi trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ 'ian, ĉian, kian, nenian, tian'<sup>2</sup> devas esti 'iam, ĉiam, kiam, neniam, tiam' (por malegaligi la vortojn 'ian' etc. kaj 'ia,n' etc.).

Se la tipografioj ne povas presi verkojn kun signetoj superliteraj (^) kaj hoketo, ĝi povas anstataŭigi la signeton (^) per la litero h kaj la hoketon tute ne uzadi. Sed en la komenco de tia verko devas esti presita 'ch=ĉ, gh=ĝ, hh=ĥ, jh=ĵ, sh=ŝ'. Se oni bezonas presi ion kun signetoj internaj (.), oni devas fari garde, ke la leganto ne prenu ilin por komoj (,). Anstataŭ la signeto (,) oni povas ankaŭ presadi (') aŭ (-). Ekzemple: sign,et,o= sign'et'o.

La vortaro, kiu estas aldonita al mia unua broŝuro, estas neplena, kaj la leganto ne miru, se li multajn vortojn en ĝi ne trovos. Sed mi ne havas la intencon eldoni aŭtore plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de l' kapo ĝis la piedoj. Ĉar unue – la kreado de tute plena vortaro estas laboro neebla por unu homo, ĉar la nombro de l' vortoj en lingvo

de l' homo estas senfina, kaj se kun ĉiu vorto oni devus atendi ĝis mi ĝin kreos, tiam la lingvo neniam estus finita afero, kiel lingvo tutmonda; la persona juĝo kaj decidoj de unu homo devas havi rolon kiel eble plej malgrandan, ĉar unu homo sur ĉiu paŝo eraras. Unu homo tie povas esti nur iniciatoro, sed ne kreanto. Lingvo tutmonda devas esti pretigita paŝo[n] post paŝo, per la kunigita laborado de la tuta civilizita mondo. Por ke lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgraŭ la disĵetita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devis krei komunan fundamenton, sur kiu ĉiuj povus labori. Tia komuna fundamento por la Lingvo Internacia devas esti mia unua broŝuro (*Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro*), kiu havas en si la tutan gramatikon de la lingvo kaj sufiĉe grandan nombron da vortoj. Tio ĉi estas la unua kaj lasta 'persona' vorto en la afero de l' lingvo internacia. Ĉio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiu el la vivantaj lingvoj. Ĉiu, kiu ellernis la diritan 'fundamenton', povas kuraĝe diri, ke li konas la lingvon internacian tute, ke li konas ĝin ne malpli bone ol la aŭtoro aŭ ol iu alia. Ĉar en ĉio, kio en la dirita broŝuro ne estas trovata, kompetenta devas esti de nun ne la aŭtoro aŭ ia alia per-sono. La solaj kompetentaj nun devas esti talento, logiko, kaj la leĝoj kreitaj de la 'plej granda parto' de la verkantoj kaj parolantoj.

(D-ro L.L. Zamenhof, daŭrigota)

## Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Ĉinio 1 – *Esperanto-insulo Hajnano* –


Belege komenĉigis la jaro de la 125-a datreveno de la apero de la Unua Libro de D-ro Zamenhof kaj la centa datreveno de la unua iniciato favore al Esperanto de la tiama ĉina ministro pri Edukado, Ĉaj Yuanpei. Kiel anoncite komenĉigis la 11-an de januaro la Esperanto-kursaro sur la Esperanto-insulo en la universitato de la paradiza sud-ĉina insulo Hajnano. Filmraporto pri la malfermo aperis sur la retejo de Edukado.net – Kurslanĉo kaj festo sur la Esperanto-insulo. Jen eltiraĵo: "Al la tutmonata programo aliĝis 110 personoj el 23 landoj. Iom pli ol la duonon konsistigas 60 ĉinoj, plejparte studentoj, kiuj kun kelkaj mongolaj samkursanoj estas stipendiataj por

<sup>2</sup> Temas pri la tempaj adverboj.

lerni la internacian lingvon ok horojn tage dum kvar semajnoj”.

Okaze de la malfermo Dennis Keefe, la iniciatinto de la afero, ricevis kun sentebla emocio kaj kortuŝiteco la tre merititan premion “Esperantisto de la Jaro 2011” (Kaliningrado, Rusio). La diplomon transdonis al li la laŭreatino de la ankaŭ tre meritita premio 2010, sinjorino Katalin Kovats, de la multlingva retejo por personoj interesiĝantaj pri edukado kaj instruado fare de [Edukado.net](http://Edukado.net).

(*Henri Masson, Francio*)



Parto de la fama Ĉina Murego

### Ĉinio 2 – Ĉinio volas malpli da angla –

Malfortaj landoj kaj popoloj rampas tra la polvo pro la anglalingva superrego, neante la proprecon de siaj universitatoj por povi nur salti sur la anglan trajnon. Sed tio ne okazas en Ĉinio! Tie komenciĝis vera kampanjo kontraŭ la influo de la angla kaj ankoraŭ pli kontraŭ la *chinglish* (ĉinangla), kiu estas la inklino uzi ĉiajn anglajn vortojn kaj terminojn en la ĉina, tiel infektante la lingvon. Laŭ deviga direktivo de la ĉina ministerio pri Informado, ĉefe por la amaskomunikiloj, anglaj vortoj kaj mallongigoj povas nur esti uzataj, se ne eblas fari alimaniere, kaj en tiu kazo la anglaj vortoj kaj nocioj devas esti provizitaj per eksplikoj en la ĉina lingvo. Eldonistoj ne rajtas supozi, ke ĉiuj ĉinoj scipovas la anglan.

(*El la flandra revuo de VOS*)

### Japanio – Internacia Virina Tago 2012 –

Jam 178 mesaĝoj el 49 landoj kaj teritorioj por la Internacia Virina Tago estas ricevitaj, kiujn ni publikigos aŭŝe en du lingvoj – Esperanto kaj la japana –, duloke dum ekspozicio ekde de 10-a de februaro kaj dum la kunveno

en la tago 11-a de marto. La 287 mesaĝojn de la jaro 2011 ni ekspozicias en nia kursejo, kiu disponas pri 50 seĝoj. (*Osioka Taeko*)

Ĉar tiel multaj mesaĝoj venas al la hiroŝima Esperanto-Centro por la Virina Tago, mia partnero Taeko, kiu tradukas ilin kvazaŭ aŭtomata maŝino, ne havas tempon prezenti al vi, kiaj ili estas. En la mesaĝoj troviĝas al mi karaj nomoj de malnovaj samideanoj, kun kiuj mi babilis en mia juneco. Jen, unu el ili estas la verkisto Tibor Sekelj, kies edzino skribis al ni: “Antaŭ unu monato mi legis libron de Nobuko Yamamoto pri Hiroŝimo: *Memoraĵoj pri flamoj*. Longe mi pensis, kian mesaĝon skribi por vi. Fine mi decidis citi mian edzon, kiu estis verkisto. Lia libro *Kumeŭaŭa, la Filo de Ĝangalo* aperis ankaŭ en via lando. En ĝi li diras i.a.: ‘Provu ĉion, kaj nur poste diru: ne eblas’. Estu tio mia mesaĝo, ĉar estas grave tiel pensi. Sincere, Erszebet Sekelj.” (*Moritaka*)

### Rusio 1 – Lingva Festivalo en universitato –

Nuntempe mi kune kun Anna Striganova estas instruisto en la rusa Universitato de Amikeco inter la Popoloj. Krome ni ambaŭ planas doktoriĝi tie post 1-2 jaroj. Tiu ĉi universitato estas unu el la plej grandaj en Rusio kaj en Eŭropo. Kadre de ĝi studas 35.000 studentoj el pli ol 150 landoj, kiuj reprezentas pli ol 450 naciojn. En ĝi konstante laboras ĉirkaŭ 7.000 instruistoj, servistoj kaj administrantoj. Post multaj malfacilaĝoj Anna kaj mi sukcesis interkonsenti kun la plej supraj instancoj de la universitato (rektoro, vicrektoro ktp.) pri tio, ke kadre de ĝi esperantistoj organizos la 12-an de februaro la 6-an Moskvan Internacian Lingvan Festivalon (interalie tio estas inventaĵo de la fama esperantisto Dennis Keefe). Laŭ la anticipaj taksoj ĝi devas kolekti pli ol 1000 partoprenantojn.


Ni alstrebas, ke ĉi-foje nia lingvo estu reprezentata laŭeble plej bone kaj vaste. Por tio ni lanĉis specialan informcentron ĉirkaŭ la aranĝo, kie ankaŭ aperos informoj pri Esperanto. Krome, unufoje en la historio de la Moskvaj Lingvaj Festivaloj ni organizos Esperanto-standon. Kompreneble, tradicie oni mencias multfoje, ke la eventon organizas la esperantistoj, kaj la lingvo mem estos prezentata kelkfoje dum la ĝenerala programo.

(*Dima Ŝevĉenko, Rusio*)

### Rusio 2 – Andreo Korobejnikov koncertis –

La 4-an de februaro je la 14-a horo nia juna rusa samideano kaj talentriĉa koncertpianisto





Andreo Korobejnikov koncertis en programo de la franc-germana TV-kanalo ARTE. Dum 70 minutoj li ludis kiel solisto kaj kun koruso kaj orkestro verkojn de la rusaj komponistoj Raĥ-máninov, Ŝostakóviĉ kaj Skrjabin.

Korobejnikov estas juna pianisto, kies talento estas mondvaste agnoskita: li jam ricevis pli ol 20 prestiĝajn premiojn. La amaskomunikiloj neniam mencias, ke li parolas Esperanton.

Kiel multaj certe memoras tion, li brile koncertis dum la UK en Zagrebo, Kroatio, en 2001 kiel 14-jara knabo. Por tiu okazo li lernis Esperanton. En 2003 li koncertis dum la UK en Gotenburgo, Svedio. Kiel 17-jara junulo li ricevis en 2004 la unuan premion dum piano-konkurso en Moskvo. En 2005 li ricevis, la duan premion kaj la unuan premion de la publiko en Los Anĝeles, Usono.

Okaze de la UK en Gotenburgo Jean Thierry intervjuis Andreon, el kiu ĉi tie sekvas parto: Li diris: “Mi tre ŝatas Esperanton. Ekzemple, kiam mi parolas kun anglalingvano, mi ĉiam staras sub li, ĉar li multe pli bone parolas la anglan ol mi. Kiam mi parolas en la angla kun japano, mi sentas, ke nek mi nek li bone parolas ĝin, kaj tio estas absurda. Esperanto estas por mi socie egaliga.” (*H. Masson, Francio*)

## Nia vasta, bunta mondo

*(Onze wijde, bonte wereld)*

### 1. GATS, nova provo de tutmondigo (GATS, *nieuwe poging tot globalisatie*)

Tutmonda akordo ebligas al entreprenoj transpreni publikajn servojn ie ajn en la mondo. Se tio okazus, tio signifus la finon de la publika sektoro. Okazaĵo en Bolivio avertas nin kontraŭ la danĝero de tiu ebleco.

Tia transpreno okazis en la urbo Cochabamba [Koĉabám̄ba] en Bolivio. Sub la premo de la Mondbanko la bolivia registaro vendis la publikan akvoprovizan sistemon de la urbo al granda privata usona akvoproviza entrepreno. Tiu aranĝo kadris en la programo de la Mondbanko por resanigi la bolivian ekonomion. La bolivianoj kredis, ke tio estis farita en la nomo de ekonomia efikeco.

La loĝantoj de Cochabamba baldaŭ spertis, al kiu speco de efikeco tio kondukas. Nur kelkajn semajnojn post kiam la entreprena flago flirtis sur la konstruaĵo de la antaŭa publika servo, la prezo de la akvo draste plialtiĝis. Multaj el la kampulaj familioj de Cochabamba devis pagi trionon de siaj enspezoj por sia akvo – pli ol tio kion ili elspezis por nutraĵoj. Krom tio la uzo de pluv-akvo kiel konsum-akvo estis farita neleĝa.

Plendoj ĉe la akvokompanio ne havis efektan, ĉar ĝia celo estis profito, kaj ne publika servo. Baldaŭ centoj, kaj poste miloj da homoj venis sur la stratojn protesti kontraŭ la privatiĝo de tiu vivnecesa baza produkto. Kvar tagoj da strikoj paralizis la urban ekonomion. Fine la registaro cedis kaj promesis malaltigi la prezojn, sed faris nenion. La demonstracioj rekomenciĝis kaj kreskis. La polico uzis larmigan gason, kaj eĉ la militleĝo estis proklamita. La haoso en la urbo estis ĝenerala, tamen la registaro kaj la kompanio rifuzis cedi. La ĉefoj de la protestoj estis arestitaj dumnokte. Malsame opiniantaj komunikiloj estis buŝumitaj. La monprofito de fremda kompanio pli gravis ol la ĉiutagaj bezonoj de la bolivia popolo.

Sed la popolo ne rezignis. La protestoj ankoraŭ kreskis. Fine, post kiam la armeo pafis 17-jaran junulon en la kapo, ĉar li partoprenis en manifestacio, la registaro cedis. Du tagojn poste, ĝi subskribis akordon per kio la akvoprovizado de la urbo denove estis metita sub la publikan kontrolon.

Kelkajn monatojn antaŭe kunveno de la Monda Komerca Organizaĵo en la nord-usona urbo Seattle estis fermita pro amasaj protestoj. Ŝajnas, ke tiu okazaĵo stopis la potencon de la tutmondigaj fortaj. Sed kelkajn monatojn poste nova serio da internaciaj interparoladoj estis organizita en Ĝenevo sub la aŭspicio de la *General Agreement on Trade in Services* (GATS): ĝenerala akordo pri komerco je servoj). Verŝajne vi aŭdis ankoraŭ nenion pri GATS. Malmulte da homoj jam aŭdis pri ĝi, ĉar ĝi ne celas konatigi sin. Sed vi devas scii,

kion ĝi volas signifi por vi, ĉar la intertraktadoj silente kontinuas. Ilia celo estas privatigi ĉiujn publikajn servojn kiel sanprizorgadon, edukadon, maljunulejojn, muzeojn, bibliotekojn, publikan transporton ktp., malfermante ilin por la privataj kompanioj. Tiel la homoj estus tute liveritaj al la arbitro de la privataj kompanioj.

*Maude Barlow, Kanado*

## 2. Salo estas vere saniga!

*(Zout is echt gezond!)*

D-ro Prof. Jan Staessen, ĉefo de la sekcio Hipertensio kaj Kardiovaskulara Reaktivigo de la Universitato de Loveno kaj liaj kunlaborantoj kuraĝis ataki unu el la du sankteĝaj dogmoj de kardiologio: nome tiu de salo kiel kaŭzo de hipertensio kaj kor- kaj angimalsanoj. Multaj aŭtoritataj kardiologoj ne povis akcepti tion.

Dum ok jaroj estis kontrolita la sal-uzado de 3.681 viroj inter 18 kaj 60 jaraĝaj en diversaj Eŭropaj landoj kaj ĝia influo sur sangotensio kaj koro. La provpersonoj estis dividitaj en tri grupoj laŭ tio ke ili uzadis 10 gr, 5 gr aŭ 2 gr da salo ĉiutage. Kaj kio montriĝis? La uzantoj de 10 gr ne havis pli altan sangotension ol la aliaj, kaj ĉe la uzantoj de 2 gr mortis kvarfoje pli da personoj sekve de kor- kaj angimalsanoj ol en la grupo de la uzantoj de 10 gr.

Konkludo: tro malmulte da salo plialtigas la riskon de kor- kaj angimalsanoj.

Prof. Staessen: "Kiam ni konsumas tro malmulte da salo, nia organismo klopodas gardi en si la ankoraŭ ĉeestantan salon plialtigante la produktadon de certaj hormonoj en la surrenaj glandoj. Kaj tiuj ĉi en la daŭro tro ŝarĝas la koron kaj la angiojn. Oni devas do bone atenti pri salmalriĉaj dietoj."

D-ro Martin Reineke, ĉefkuracisto de la sekcio Interna Medicino en la universitato Ludwig-Maximilian de Munkeno diras: "Nur en kelkaj difinitaj kazoj de grava malsano, kiel hepatocirozo, tre alta sangotensio aŭ ĉeso de la renfunkciado, oni devas forte limigi la uzadon de salo."

Antaŭaj studoj jam montris, ke eĉ ĉe alta saluzado la sangotensio plialtiĝas nur per 1 ĝis 2 mmHg kaj ĉe maljunaj personoj maksimume per 5 mmHg. En normala homa lingvo tio signifas sangotension de 14 ĝis 14,1 kaj 14,5, kaj ke ĉe forta sallimigo la sangotensio plimaltiĝas nur per 1 mmHg, praktike de 14 al 13,9 aŭ de 19 al 18,9.

Jam fine de la naŭdekaj jaroj de la antaŭa jarcento la *Albert Einstein College of Medicine* en Novjorko faris la scienca konkludon, ke la

risko de morto preskaŭ duobliĝis ĉe homoj kiuj ne uzas sufiĉe da salo kompare kun homoj kiuj uzas tro da salo. Tio ne signifas, ke troa uzo de salo estus rekomendebla!

Ĉe salmalriĉa kaj certe ĉe sensala dieto salo estas deprenata de la ostoj por subteni la sal-nivelon en la sango. Salmanko, kiu tre ofte konstateblas ĉe maljunuloj, certe en maljunulejoj, kaŭzas ostomoliĝon (osteomalacion) kaj malkalkiĝon (osteoporozon), sed ankaŭ dormemon kaj hebetecon. Sufiĉe da salo ankaŭ necesas por forpeli acidon el niaj ĉeloj kaj nia organismo. Tro alta acidotitro povas grave damaĝi la heredan DNA kaj tiel plialtigas la riskon de kancero. Nesufiĉa konsumo de salo povas kaŭzi senhidratiĝon, kiun oni konstatas ĉe multaj maljunuloj. Tio kaŭzas malbonan renfunkciadon, kio siavice kaŭzas plialtiĝon de la sangotensio. Kaj tiam la kuracisto preskribas urin-stimulajn pilojn, kio ankoraŭ plialtigas senhidratiĝon, plimalbonigas la trasangadon de la renoj kaj plej ofte ankaŭ forigas kalcion, kiu protektas nian koron kaj plimalaltigas la sangotension! (*W.J. Duckaert, el 'Maar natuurlijk gezond genieten'*)

## 3. Malmultekosta brulaĵo

*(Goedkope brandstof)*

Ekde 2007 la angla firmao Cella Energy ekzamenas specon de superbrulaĵo, kiu eligas tre malmultan karbonhidrogenon, povas esti produktata mediprotekta kaj esti uzata en konvenciaj eksplodmotoroj sen multaj adaptoj.

Post tri jaroj la firmao finpretigis la brulaĵon. Temas pri hidrogeno, sed sub alia formo. Kiel vi eble scias, hidrogeno povas esti deponata nur sub ekstrema malvarmigo. Cella Energy solvis tiun problemon, kaj la produkto povas

*Met de hartelijke groeten van  
Kun la koraj salutoj de*

**KBC-Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5  
B-3940 Hechtel  
Tel. 011-73.02.20  
Fax 011-73.02.21  
[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

nun esti deponata tute kiel benzino. Sed la plej grave de ĉio estas, ke la prezo ĉe la pompilo troviĝus inter 0,25 kaj 0,30 eŭroj por unu litro! Tio, kune kun la neglektebla gas-eligo, ŝajnas tro bela por esti vera. Sed tamen ĝi estis konfirmita per la patentigo far Cella Energy.

Sed estas problemoj. La grandaj olekompanioj sentas sin minacataj kaj malhelpas Cella prezenti sian novan brulaĵon al klientoj kiel vi kaj mi per siaj retaĵoj. Kompreneble pri tio ĉi ankaŭ silentas la multmilionuloj kiuj investis en nafto. Valoras la penon sciigi al la tuta mondo, ke tiu ĉi brulaĵo vere ekzistas. Tial traduku kaj plusendu tiun ĉi artikolon al ĉiuj viaj kontaktpersonoj. Pli da informoj pri tiu ĉi brulaĵo vi trovos ĉe [www.cellaenergy.com](http://www.cellaenergy.com). Bedaŭrinde la teksto estas nur en la angla.

*(Laŭ la interreto)*

## **La usona interna milto (1)**

*(De Amerikane burĝorlog)(1)*

Precize antaŭ 151 jaroj, en aprilo 1861, eksplodis en Usono la interna milto, kiun oni nomas ankaŭ la 'secesia milto'. Tiam ĉuj pensis, ke ĝi daŭros nur kelkajn monatojn, sed ĝi daŭris kvar jarojn: ĝis en aprilo 1865! El ĉiuj militoj, en kiuj partoprenis la usonanoj, tiu ĉi estas la multe plej sangeca por ili: en ĝi estis mortigitaj ĉ. 620.000 usonanoj. Kvankam la intereso pri tiu milto estas hodiaŭ tre granda en Usono, oni oficiale provas forgesi ĝin.

Ĝenerale oni kredas, ke la norduloj batalis kontraŭ la suduloj por liberigi la sklavojn. Kontraŭe prezidento Lincoln liberigis la sklavojn nur la 01.01.1863 kun la celo gajni la milton, neniigante la sudan ekonomion, ĉar preskaŭ ĝis la fino la venko de la Nordo estis necerta. Post la unua batalo inter la Nordo kaj la Sudo apud Bull Run en Virginio, kiu okazis

la 16.07.1861, la usona Kongreso deklaris, ke 'la milito ne estos batalata por perturbi la establitajn instituciojn de la ŝtatoj', per kio ĝi celis unuavice sklavecon.

Ĝis la mezo de la XIX-a jarcento sklaveco estis ĝenerala akceptita fenomenoj en la mondo. Kiam Usono sendependiĝis en 1776, la Kongreso dividis la Union en sklavohavajn kaj sensklavajn ŝtatojn. Kiam nova ŝtato aliĝis al la Unio, oni decidis pri tio, ĉu ĝi permesu sklavecon aŭ ne. En 1860 Usono ampleksis 32 ŝtatojn: 18 sensklavajn en la Nordo, 11 sklavohavajn ŝtatojn en la Sudo kaj 3, la t.n. limŝtatoj kiuj ankoraŭ ne decidis inter la du eblecoj. Tamen estis sklavoj en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj, kaj ankaŭ multaj norduloj aprobis sklavecon.

La Sudo havis tiam ĉ. 18.000.000 da loĝantoj, inter kiuj 6.000.000 da sklavoj. Laŭ takso de norda juĝisto ĉ. 60.000 sklavoj sukcesis fuĝi norden: tiu estis 1 el 100. Post la milito eksaj sklavoj iris al la Nordo por trovi tie laboron. Sed la unua nirgrulo kiu atingis Novjorkon estis pendumita de arbo sen proceso.

Sed la opinio pri sklaveco rapide ŝanĝiĝis en la mondo. Tial eble sklaveco estis preskaŭ samtempe abolita en Usono kaj Rusio. En Usono temis pri nigruloj importitaj el Afriko, dum en Rusio la servutuloj estis veraj rusoj. Caro Aleksandro II abolis servutecon en Rusio en 1861. Sed ambaŭ ŝtatestroj neglektis krei vivrimedojn al la ekssklavoj. Dum en Usono sklaveco parte kaŭzis la internan milton, en Rusio ĝia abolo estis fekunda grundo por la komunisma revolucio de 1917.

La kaŭzoj de la usona interna milto estis la grandaj diferencoj inter la Sudo kaj la Nordo. La ekonomio en la sudaj ŝtatoj estis monokultura agrikulturo. La suduloj kultivis kotonon kaj tabakon, kiujn ili eskportis al la Nordo kaj al Eŭropo. Por ĉiuj aliaj produktoj, kiel vestaĵoj kaj maŝinoj, ili dependis de la Nordo. Por iliaj vastaj plantejoj ili bezonis multajn malmultekostajn laboristojn. Tial ili aĉetis nigrulojn, sed ankaŭ 'bredis' ilin.

La suduloj estis riĉaj, posedis belegajn domojn kaj konsideris sin kiel aristokratojn. Ĝenerale ili estis la pli malnovaj civitanoj de Usono. Ili malestimis la nordulojn, kiuj estis ĝenerale pli novaj kaj malriĉaj. Malŝate ili nomis ilin 'yankees' ['jenkiz], kio estas misformo de 'Jan Kees', nomo por la holandoj kiuj fondis Novan Amsterdamon, la nunan Novjorkon. Ĝis ĉ. 1860 la sudaj ŝtatoj estis ekonomie kaj poli-tike pli gravaj ol la nordaj.

Sed post 1850 en la Nordo komencis disvol-





Nigraj sklavoj en Virginio ĉirkaŭ 1860

viĝi industrio, precipe peza industrio kiel ŝtal-industrio, kiu bezonis multajn laboristojn. Multaj malriĉaj eŭropanoj enmigris en la Nordon, kie ili trovis laboron en la industrian, per kio ankaŭ la nombro de la enloĝantoj forte kreskis. Tiuj laboristoj estis liberaj homoj, sed ilia stato estis apenaŭ pli bona ol tiu de la sudaj sklavoj.

La balancilo decidis do iom post iom favore al la Nordo. Samtempe pli kaj pli da norduloj, kaj ankaŭ kelkaj suduloj, konvinkigis pri la maljusteco de sklaveco. Grandan influon tiurilate havis la romano *Uncle Tom's Cabin* (La kabano de onklo Tom) de Harriet Beecher Stowe, kiu aperis libroforme en 1852. La libro estis vera furoraĵo, kiun legis amaso da norduloj. La tragika historio de la nigro, onklo Tom, kiu estis batmortigita de sia lasta mastro, fortege emociis ĉiujn legantojn.

Multaj norduloj ekmalamis la sudulojn pro la sklaveco. En majo 1856 la suda senatano Andrew Butler el Sud-Karolino estis preskaŭ batmortigita de nordulo per promenbastono en plena senato. Butler loĝis en Sud-Karolino, posedis sklavojn kaj ankaŭ ne malŝatis belajn sklavinojn, kio tute ne estis escepto.

En la sama jaro Kansaso, kiu situas okcidente de la rivero Misuro, estis ankoraŭ libera ŝtato kaj do ankaŭ dubis. Poso<sup>1</sup> de ĉirkaŭ mil porsklavecaj viroj invadis la urbon Lawrence kaj mortigis la guberniestron de la ŝtato kaj kvar konsilistojn, kiuj estis kunvenintaj en hotelo kaj kontraŭis sklavecon.

En 1859 farmisto John Brown, fanatika kontraŭulo de sklaveco, armis siajn kvar filojn kaj du aliajn virojn per malnovaj armesabroj kaj iunokte mortigis kvin malriĉajn, senkulpajn

kansasajn farmistojn, pro tio ke ili simpatias kun la Sudo. Tiel li volis venĝi la morton de la guberniestro kaj la kvar konsilistoj. Poste li provis kapti armean arsenalon, per kiu li volis armi armeon por liberigi la sudajn sklavojn. Li estis arestita de kolonelo Robert Lee en Virginio, kondamnita al morto kaj pendumita. Multaj norduloj, precipe la t.n. abolistoj, konsideris lin kiel heroon, pri kio atestas la konata kanto *John Brown's body lies amouldrin' in the grave, his soul is marchin' on. Glory halleluia!* (La korpo de John Brown kuŝas putrante en la tombo, lia animo estas marŝanta plu. Gloro haleluja!)

En novembro 1860 la nordulo Abraham Lincoln el Kentukio estis elektita prezidento de Usono. Jam en 1854 li deklaris, ke sklaveco estas 'monstra maljusteco'. La suduloj ne volis esti regataj de nordulo kaj deklaris sian sendependecon. Komence de aprilo 1861 ses sudaj ŝtatoj forlasis la Union kaj fondis la Konfederajn Ŝtatojn de Ameriko: estis Sud-Karolino, Alabamo, Georgio, Misisipio, Luiziano kaj Teksaso. Iom poste ankaŭ Virginio, Arkansaso, Nord-Karolino kaj Teneseo aliĝis al ili. Ili elektis propran prezidenton, senaton kaj ĉefurbon, nome Richmond en Virginio, kaj estigis propran armeon. Ili faris tion por, laŭ ilia diro, protekti sian propran vivostilon. Ili prave diris, ke ili libervole aliĝis al la Unio, kaj do havis la trajton forlasi ĝin. Sed la nordaj ŝtatoj ne akceptis tion kaj nomis ilin ribeluloj.

La suduloj komencis la militon tri monatojn post la inaŭguro de Lincoln kiel prezidento. Per kanonoj ili pripafis la nordan fortikaĵon Fort Sumter, kiu staris sur insuleto antaŭ la oceanbordo fronte al Charleston, haveno en Sud-Karolino. Ili esperis, ke tio sufiĉos por devigi Vaŝingtonon akcepti la secesion. La fortikaĵo kapitulacis.

Nek la Nordo nek la Sudo estis preta fari militon. La norda armeo enhavis tiam nur 16.000 soldatojn. Ĉiuj altaj oficiroj en la suda kaj norda armeoj studis en la militista akademio de West Point en Pensilvanio. Ili ne nur konis unuj la aliajn, sed ofte estis amikoj.

En aprilo Lincoln alvokis 75.000 virojn por servi en la federa armeo, sed nur por tri monatoj. Laŭ li tiu periodo sufiĉos. La diversaj ŝtatoj formis regimentojn kaj transdonis ilin al la Unio. La norduloj estis tiel entuziasmaj pri la milito, ke multaj junuloj libervole aliĝis al la armeo. La rekrutcentroj estis sturmitaj de volontuloj. En Iovo (Iowa) dudekfoje la kvanto de la bezonataj volontuloj deziris servi.

<sup>1</sup> Grupo da armitaj viroj.

Knabinoj devigis siajn fianĉojn enlistigi en la armeon. La ĝojo ĉe la norduloj estis ĝenerala: jubilantaj homoj plenigis la stratojn, kaj oni sonorigis la preĝejsonorilojn. Kelkfoje la tuta afero similis al grandega pikniko.

La trejnado de la rekrutoj estis nesufiĉa kaj eĉ priridinde malbona. La oficiroj, kiujn oni elektis surloke, ofte ne sciis pli pri trejnado, ol la rekrutoj, kiuj plu nomis ilin per iliaj antaŭnomoj. Disciplino estis granda problemo, ĉefe por la junuloj el la okcidentaj ŝtatoj.

En la limŝtatoj Marilando, Kentukio kaj Misu--rio la opinioj pri sklaveco estis dividitaj. La 19-an de aprilo la unua regimento kiu marŝis tra Baltimore, ĉefurbo de Marilando, estis engaĝita en stratbatalon kun grupo da civilaj secesiistoj. Pluraj milicianoj kaj civiluloj estis mortigitaj. Tiam Vaŝingtono, kiu ankaŭ situas en Marilando, sendis armeon al Baltimore, kiu restaŭris la ordon. Sen tio Marilando certe estus elektinta la flankon de la secesiistoj.

En la okcidenta parto de Virĝinio la plej multaj homoj bedaŭris la secesion. Precipe tiuj kiuj loĝis trans la montoj, kie estis malmultaj sklavoj. Tial ili volis separiĝi de Virĝinio kaj krei sendependan ŝtaton, kio efektive okazis.

*(Laŭ Bruce Catton – daŭrigota)*

## **Nia rakonto: La poploj**

*(Ons verhaal: De populieren)*

*Al ni nekonata rus(in)o verkis tiun ĉi belan porzajon. La tradukintino estas rusino kiu loĝas en la norda havenurbo Murmansko. Ŝi prefere tradukas rakontojn pri la naturo.*

Pri ili oni ne povas ne pensi: ja ili la tutan tempon estas ĉi tie, apude.

Eĉ se ilin oni ne vidas, oni aŭdas ilian bruon, balbutadon, susuron, depende de tio, kia estas la vento ekstere aŭ kiu sezono estas. Eĉ dum vintro tra duoblaj vitroj por mi aŭdeblas seka, kvazaŭ frosta susuro, kvazaŭ ili mallaŭte frotas branĉon kontraŭ branĉo.

La poploj en ĉiuj flankoj ĉirkaŭas mian domon – la plej altan duetaĝan domon en la vilaĝo – sed ili estas eĉ pli altaj ol la grandega domo! Mi tuj apartigis ilin de ĉio, kio aperis ĉirkaŭ mi en la vilaĝo, tuj post kiam ni transloĝiĝis ĉi tien.

Sendube, plej bone la poploj aspektas dum somero. Bruemaj, maltrankvilaj, per la speguletoj de siaj malhelbrilaj folioj ili dispecigas la sunon je miloj da pecetoj, brilantaj kiel fajreroj, kaj pleniĝas per ili de la pintoj ĝis la malsupraj branĉoj. La arboj forskuas tiujn fajrerojn

en la herbon kaj polvon apud siaj piedoj. Tial helaj, sunaj makuletoj la tutan longan someran tagon trembrilas sub la arboj, jen aperante, jen malaperante denove.

Ankaŭ vintre la poploj estas ĉi tie, post la fenestro. Per la nudaj ŝvelintaj artikoj de siaj rigidaj branĉoj kun ŝpinilformaj grandaj burĝonoj ili subtenas, ŝajne, la griz-blanketan pufiĝintan ĉielon de la vintro. Dum la sunaj tagoj ilin ornamas prujno. Kaj tiam densa bluo filtriĝas kaj filtriĝadas la tutan tagon tra la blanka maldiafana kaj pikebrila sukera reto de iliaj pintoj.

Ili estas la unuaj, kiuj sentas printempon. Okazas, ke jam en la lasta semajno de februaro, kiam matene la suno vekas vin, vi levas la kapon de la kuseno, ekrigardas tra la fenestro, kaj blua-ora ĉielo per sia varmo torentas en viajn okulojn! Alkutimiĝinte al la lumo, vi komprenas, de kie venas la varmo kaj oro – de la poploj!



La desegnaĵon 'Poploj' faris la germanaj samideanoj Dorothea kaj Georg Kaiser el Altenburg.

Kiel mole, kiel jam flekse balanciĝas ili per siaj branĉoj, subite post la vintra senkolorco pleniĝintaj per flav-griza kaj verdeta koloroj; kaj la akrapintaj burĝonoj jam ne alpremiĝas al la branĉoj, ne penas kunflui kun ili, sed kuraĝe elstaras kaj, ŝajnas, jam iomete rondiĝis. Kaj vi subite (kvazaŭ konsternita de la konjekto) per la tuta haŭto, per la tuta korpo, dolĉe sentas: printempo alproksimiĝas! Printempo, printempo!

Kaj ŝajnas, ke vi jam sentas la aromon de la flava, popla rezino, la unuan vivan kaj klaran aromon de printempo, malgraŭ tio ke dume ĉe la fenestroj estas duoblaj vitroj, kaj la neĝo ankoraŭ ne estas tuŝita de sunradioj kaj difektita per varmo.

Sed aŭtune la poploj volas kuri. Tion mi precize scias. Iun aŭtunan ventan nokton mi vidis, kiel furiozis ili, kiel balanciĝis, provante



elŝiri sian trunkon, fortegan elefantan kruron, el la tero, disŝiri la radikojn, postkuri la venton, la nubojn. U – u – u, kiel ili svingiĝis per siaj pintoj, perdante la lastajn foliojn, kiel ili muĝis, kiel furioze ĵetadis post la vento Grandajn branĉegojn – kvazaŭ negrandajn arbojn: se tia branĉo frapus mian fenestron, verŝajne elfalus la fenestrokadro.

Sed, certe, la poploj forkuris nenien. Matene ili staris kvietaj, kvazaŭ subpremitaj de la malsukceso. Ĉirkaŭe senorde kuŝis iliaj vivaj branĉoj, ie kun folioj. “Ĉu jam estas la fino?” ekpensis mi, rigardante al la branĉoj. “Jam estas la fino: ree ilin oni ne prenos.”

Aŭtune ĉiuj sentas sin malkomfortaj. Ĉiuj deziras ien kuri. Sed la poploj ĉiam restas, ili gardas mian domon, respoguliĝante en ĝiaj altaj, puraj, malhelaj fenestroj, kiuj ofte pensigas pri arbaraj lagoj.

Mi delonge pensas pri la poploj. Ekde tiam, kiam ni ekloĝis en la malnova duetaĝa domo, restinta – oni diras – ankoraŭ de bienulo, mi pensas, ke la poploj ĉirkaŭantaj la domon en ĉiuj flankoj estas ne kiel la aliaj arboj: ja ili ne memstare kreskas, ilin plantis homoj. Kaj al mi ŝajnas, ke pro tio ili multon scias pri la homoj, kaj ni scias pri poploj nur tion, kion ni vidas. Jen mi loĝas ĉi tie ekde antaŭnelonge, kion mi povus scii? Sed ili kreskas ĉi tie delonge kaj tre multe memoras. Kiu ilin plantis? Ĉu servistoj de la bienulo, kies estis la domo? La poploj kaj la domo vidis, kiel tie ĉi oni loĝis antaŭe, kiaj homoj vagadis, pri kio ili parolis...

Nuntempe ĉi tie loĝas ni, kaj ili rigardas nin, rememoras aliajn homojn, kaj scias ĉion pri ni. En tiun tempon, el kiu devenas la poploj kaj la domo, ni ja ne povas paŝi. Al ni restas nur konjekti, nur rigardi kaj aŭskulti: ĉu rakontos ion la maljunaj gravaj arboj? Ĉu ili malkovras sekretojn? Sed ĝis nun ili rakontis al mi nur pri sezonoj, pri la forto de la vento kaj pri tio, kiel brilas la suno hodiaŭ: ju pli ĝoja estas la brilo de la folioj, des pli da sunradioj estas. Sed tamen ili devigas min pensi pri mistero. Pri tio, ke ne ĉio estas tiel simpla ĉirkaŭe, kiel ni vidas.

La poploj ĉiam estis antaŭ miaj okuloj kaj, rigore leviĝis super mi, kvazaŭ en signo de atento, sugestante min: “Rigardu, aŭskultu, pensu!” Baldaŭ mi eksentis, komprenis, ke ili akceptis min kiel sian amikino. Okazas ja, ke aĝuloj amikas kun etuloj...

*(Tradukis el la rusa: Olga Goriĉenko)*

## AKTIVAĴOJ DE LA LIMBURGA ESPERANTO-ASOCIO

### En januaro kaj februaro 2012:

Ĵaŭdon, la 12.01.2012:

En la Malgranda Salono de la Kultura Centro de Peer prelegis kaj kantis la konata rusa trubaduro, poeto kaj verkisto, Miĥaelo Bronŝtein. Proksimume 35 personoj, esperantistoj kaj ne-

Esperantistoj, ĉeestis la aranĝon kaj tre atente aŭskultis la prelegon de Bronŝtein pri lia naŭjara restado en la minejo de Vorkuta dum la komunista reĝimo. Vorkuta situas trans la polusa cirklo en la plej nord-orienta angulo de eŭropa Rusio. Tie li gvidis la elfosadon de la karbo, kiun bezonis la rusa peza industrio. Li kompreneble rakontis ĉion en Esperanto. Jan Doumen tradukis ĉion en la nederlandan por la sufiĉe multaj neesperantistoj. Post la prelego la ĉeestantoj povis meti demandojn, al kiuj Bronŝtein respondis. La tradukado kaŭzis ja tempo-perdon, sed tiel la neesperantistoj povis aŭdi, ke Esperanto estas vera lingvo, kiun oni povas flue paroli kaj en kio oni povas esprimi ĉion. Post mallonga paŭzo Bronŝtein kantis kantojn en kvin lingvoj, inter kiu Esperanto. Liajn komentariojn tradukis Remy Sproelants.

Ĵaŭdon, la 23.02.2012:

Antaŭ malgranda, sed tre atenta esperantista publiko Bert Boon prelegis pri la bonfama kaj eminenta flandra verkisto Willem Elsschot kaj ties verkoj, precipe pri “Het Dwaallicht”, kiun Bert tradukis en Esperanton sub la titolo “La Vaglumoj”, kaj kiu estas havebla ĉe FEL. Bert Boon estas la fondinto kaj la prezidanto de la tinena esperantogrupo, la Hirundo, kies kerno estas grupeto da skoltoj. Pro tehnikaj problemoj la projekcio de la filma versio ne okazis.

### Aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2012:

Ĵaŭdon, la 29.03.2012:

Henri Schutters gvidos tre interesan vortludon. Ĉiuj ĉeestantoj divenas laŭvice unu literon de serĉenda esperanta vorto. Ĉiu bona litero liveras unu poenton. Tiu kiu divenas la tutan vorton ricevas ekstrajn poentojn.

Ĵaŭdon, la 26.04.2012:

Esperanta Kantovespero. Jan Doumen gvidos la vesperon kaj Paul Hotterbeekx akompanos la kantojn sur sia gitaro. Li ankaŭ kantas kelkajn proprajn numerojn.

